

mentoj estas demandoj al la dioj, gravuritaj sur ostoj, kiuj, deponitaj sur fajro, indikis la dian respondon laŭ la rompfendetoj de la kalcinitaj ostoj. Tiuj signoj evoluis iom post iom.

Sed oni devas scii 3500 signojn por legi gazeton ; 2 ĝis 30 strekoj estas necesaj por desegni unu signon. Senco kaj prononco estas malfacilaj.

Similaj signoj povas enteni malsamajn sencojn ; por ilin kompreni, oni aldonas ideogramon, kiu aliĝas al la signo sed ne estas prononcita : estas ŝlosilo (vidu ilustraĵon). 3 (per aldono de 1 kaj 2) signifas morus arbo. 4 (per aldono de 5 (buŝo) signifas gorĝo.

Je la universitata nivelo 5 ĝis 6.000 signoj estas necesaj, por la klasika literaturo 10.000.

La ideogramoj okazigas multe de malfacilaĵoj : por presado, la tekstoj estas mane vicigitaj (7.000 signoj) ; por la telegrafo : ĉiu signo bezonas kodon. Do, 2 tradukoj estas necesaj, ĉe la foriro kaj la alveno ; granda malfacilaĵo por la gazetistoj inter aliaj. La vortaroj, indeksoj kaj referencoj estas nekontentigaj. Pro ĉio ĉi, la latina alfabeto, kiu estas la plej vaste utiligata, iom post iom anstataŭas la malnovajn ideogramojn. Sed alia malfacilaĵo : unuecigi la parolmanierojn de la ĉina lingvo kaj popularigi la komunan fonetikan lingvon, kun norma prononco de Pekino.

Tamen studentoj estas devigataj lerni tradiciajn ideogramojn, kiel ekzemple en Francujo kaj Anglujo, oni studas grekan kaj latinan lingvojn.

Alia speco de skribo estas la malnovegiptaj hieroglifoj. Oni tuj pensas pri la ŝtono de Rosette kaj la famo de Champolion, kiu sukcesis traduki tiun skribaĵon, komparante ĝin kun la

apudaj en kutima skribo kaj en greka lingvo.

Kun la Egiptanoj, Kretanoj kaj Ĉinoj, la Mesopotamianoj efektivigis la unuan paŝon al la silaba skribo kaj dank'al evoluo de la desegno aperis kojnoforma skribo per pintigita kano sur mola argilo, antaŭ kuirado.

La apero de la strekaĵoj, kiuj fariĝis nia alfabeto, okazis en Fenicujo kaj norda Sirio, eble 1.300 a.k. Estis alfabeto de 22 literoj, konsonantoj. Dank'al semitaj vojaĝantoj, la Grekoj konis tiun alfabeton kaj aldonis vokalojn.

De la skribo de norda Sirio devenas, inter aliaj, la etiopia, la kvadrata israelia, tiu de kelkaj popoloj iraniaj, turkaj, mongolaj, beduanaj de Arabio. Dank'al la disvolvigo de islamismo, la araba skribo eniris internan kaj centran Azion, parton de Hindio kaj Afriko.

Dum la evangelizado, oni uzis grekan skribon en Afriko, norde de Nigra Maro, por la ĝermana gotiko ; post modifoj, en U.S.S.R. kaj slavaj landoj ; ankaŭ en Italio, ĉe etruskaj kaj latinaj popoloj. Ĝi naskis la malnovajn ĝermanajn kaj skandinavajn alfabetojn.

Fakaj scienculoj studis kaj ankoraŭ studas malnovajn skribmanierojn : tiun de Sumero, de Saharo, de la Indianoj Mayas, kiun oni ĵus deĉifris dank'al elektronaj maŝinoj ; sed ankoraŭ ne detradukitaj estas skribo sur argila disko de Kreto, sur ŝtonaj sigeloj en Penjab kaj en Paskinsulo.

G. ROUX.

19-6-6
 Le b776b777 5 55° 5 5 5
 5 5 5 5 5 5 5 5 5 5

Tute nova skribo de la kanadaj eskimoj. Senco :
 « Unua konferenco de la nord-polusaj kooperaj societoj ».